

Korespondanta Fako KOSTO de tiuj ĉi anoncoj: po 0'10 frank ĉiu linto

9. — *Fino Eliska Hejrovská, S-ro Agustino Divis, S-ro Josef. Gross kaj S-ro Mart. Sládková*, el Rokycany. (Bohemia-Austria); deziras korespondadi,
10. — *Fino. Rose Stadler*. Wenzelsplatz, 63, Praga, (Bohemia-Austria); deziras korespondadi.
12. — *Rafaelo Rubio*, str. Vilanova, 16, Barcelono (Hispanujo), volus intersangi postkartojn kun gesamideanoj.
13. — *Mult 'Am'* (dudek jara) deziras korespondadi letere aŭ postkarte kun inspirema kaj filozofema fraŭlino. Adresu: Mult 'Am' — c. Pelayo, 58 (porteria) — Barcelono.
14. — *Gulielmo de Oliveira*. Rua Muriqui, 1, enantado. Rio Janeiro. Deziras korespondadi per postkarto.
15. — *Aleksandro Franseres*. Redactor; Largo San Francisco, 36, Rio Janeiro. Deziras korespondadi per postkarto.
16. — *Marciano* Hospicio, 14, Sob. Deziras korespondadi per postkarto.
17. — *Salvador Oland*. Rua Quintana, 147, Rio Janeiro. Deziras korespondadi per postkarto.
18. — *Pleno Fernández*. Rua Victoria, 57, Brazil. Sao Paulo. Deziras korespondadi per postkarto.
19. — *Fino Evangelia Alexandron*. Aidin (Turquie d'Asie).
20. — *Fino Andromoki Orfandés*. Aidin (Turquie d'Asie).— Tre deziras korespondadi per ilustritaj postkarto (Extra-Beautés) kun ĉiulandaj gesamideanoj. Ĉiam kaj tuj respondos.
21. — *F. Font y Perxes* — Ce S-ro Vallet, studento. str. Rambla de Catalunya, 117, apoteko, inters. ilust. postk. Kun aŭ sen teksto.

ESPERANTISTOJ!!

Petu, per ilustrita postkarto, specimenajn numerojn senpage riceveblajn de S-ro R. Tobella Casellertort (Asalto, 45, Presejo; Barcelono).

LA DU STELOJ

Monata gazeto de Ĉiĉa Esperantista Asocio.
Sola esperantista propaganda gazeto elirante regule en Ĉiĉo.
En Esperanto kaj hispana lingvo, kun ilustraĵoj.

Redakcio kaj administracio:
Ĉiĉa Esperantista Asocio, Casilla, 723
SANTIAGO CHILE

Jarabono, 2 Sm. (Fr. 5)

LA BELA MONDO

MONATA REVUO
ILUSTRITA KAJ BONE ELDONITA

Redakcio: ALBERT SCHRAMM
Bismarckplaco, 12
Germanujo DRESDENO

Jarabono: 7 fr.

Tutmonda Espero

(KATALUNA ESPERANTISTO)

Organo de la kataluna esperantistaro

Aperas ĉiumonate en esperanta kaj kataluna lingvoj; kataluna literaturo; enlanda kaj eksterlanda movado; sciigoj pri la Barcelona Kongreso; k. t. p.

JARE 3 fr. (1'20 sm.)

ANONCOJ

Tuta pago . . . 12 frankoj. (4'80 sm.)
Duono da pago. 7 » (2'80 »)
Kvarono . . . 3'50 » (1'40 »)
Okono . . . 2 » (80 sd.)

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
Paradis, 12 - BARCELONO

Pri administraciaj aferoj, sin turni al S-ro Ribera, Raurich, 6 «El Ingenio», Ludilvendejo, Barcelono.

ESPERANTA PRESEJO  Strato Asalto, 45 - BARCELONO -

TUTMONDA ESPERO

(KATALUNA ESPERANTISTO)



Barcelono, Marto 1909^o

35 cent.

SURMURA ĈIUMONATA ALMANAKO POR 1909. Kun diverskolora esperanta alegorio, kaj bela potreto de D-ro Zamenhof. Un ekemplar, Ptas. 0'25

Gramatica catalana de la llengua internacional Esperanto, per F. Pujula i Vallès. Pesetes 2'50 enquadernada. 2 en rustica.
 Vocabulari Esperanto-Català, per F. Pujula i Vallès. 3'50 enquadernada. 3 en rustica.
 Curs practic de la llengua Esperanto, per F. Pujula i Vallès. (Conjunt d'exercicis practics pera aprendre l'Esperanto en poc temps.) 2 encuadernada. 1'50 en rustica.

	Pesetes		Pesetes
1. ^a Oficiala (Targeta Postal Congrès). Una 5 cts. El cent.	5	Fundamento de Esperanto, Dr. Zamenhof (edició en 5 llengües: francès, anglès, alemany, rus, polonès).	2'50
2. ^a Oficiala (Targeta Postal Congrès). Una 10 cts. El cent.	7	Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto. Dr. Zamenhof.	4'70
Postal Propaganda Congrès Esperantista. Una 5 cent. El cent.	4	Advokato Patelin, de Brueys & Palaprat, traducció de M. P. Evrot.	1
Targeta postal a tres tintes, amb el retrat del Doctor Zamenhof. Una, 5 cts. El cent.	4	¿Quiere V. aprender Esperanto?; manual de la conversació esperanta (en castella), del Dr. J. Bremon i Masgrau.	0'50
Tra la Mondo per Esperanto, poema de G. Ciklari.	0'25	Gramatica y vocabulario Esperanto, de J. Bremon (en castella).	3
Kataluna SLOSILO (en prempsa)		Monadologio, de Leibnitz, traducció de E. Boirac.	0'80
La Rompantoj, cinc monolecs en un acte, de F. Pujula i Vallès.	1'50	Cikado de formikoj, comedia en un acte de Labiche & Legouvé.	0'80
Programa d'Esperanto (preguntas gramaticals), per J. B. Albiñana.	0'25	Manuel Esperanto, curs practic en francès.	2
Esperanto. Petit curs en francès.	0'10	Diversaĵoj, contes i legendes, traduïts de Lallemand & Beau.	1'60
Matematika terminaro kaj Krestomatio, de R. Bricard.	1	Kolekto. Pujula. Col·lecció de contes luxosament editats amb paper tina.	0'50
Col·lecció d'A. Jiménez Loira: Verba Amuzaĵo, Plena verba konjugació per paroladeto.	0'10	La Grafo Erarinta.	0'50
Cent-Dek-Tri Humoraĵoj, dua eldono.	0'35	Naivulo. Karabandolo. La plugisto. Fiskaptisto kaj rigardanto.	0'50
Personaj Nomoj. Provo de esperanta nomigado.	0'75		
La Perfekta Edzino. Tradukita el la fama hispana verko de monaĥo Ludoviko de Leon.	2		

Se proporciona, además, qualsevulga article i totes les obres d'Esperanto, tant antigues com modernes; aixís com se suscriu a totes les revistes i periòdics esperantistes. Sagell de goma: "Oni korespondas esperante". Un 0'75 ptes.—Dlapiços niquelats de butxaca: "Aprengueu l'Esperanto". Un 0'25 ptes.—Estrelletes, (variadíssima col·lecció). Desde 0'75 a 2 ptes.
 Rebaixes als llibreters i corresponsals. Per més detalls, dirigiu-se a

Propaganda Fako "Espero Kataluna" - Paradis, 12 - Barcelona

TUTMONDA ESPERO

(KATALUNA ESPERANTISTO)

Ĉiumonata revuo organo de la kataluna esperantistaro

Redakcio kaj Administracio: Paradis, 12 - BARCELONO (Societo «Espero Kataluna»)

2^a Jaro

Barcelona, Marto 1909^a

N-ro 15

ENNAVO: III^a CIRKULERO PRI LA V^a INTERNACIA ESPERANTISTA KONGRESO.— UNUJ ESPERANTISTAJ FLORAJ LUDOJ.— AL «ESPERANTISTEN».— SENORA KARITATO.— CARITAT DESORDENADA.— LA POŝHORLOĜO KIEL KOMPASO.— KURIOSAĴO.— KREDO.— ANEKDOTO.— MOVIMENT ESPERANTISTA CATALA.— MOVIMENT ESPERANTISTA MONDIAL.— BIBLIOGRAFIO.



III^a CIRKULERO PRI LA V^a INTERNACIA ESPERANTISTA KONGRESO

AL LA ESPERANTISTARO:

En niaj pireneaj landoj ekzistas jam de longa tempo ĉarma kutimo.

Ĉinjare estas organizata publika konkurso inter la poetoj.

La temoj proponitaj estas ĉiam la samaj: verki poezion pri AMO, pri FIDO kaj pri PATRUJO.

La ordinaraĵ premioj konsistas el floroj ĉu naturaj ĉu artefaritaj; jen kial la konkurso estas nomita «Floraj ludoj».

La disdonado de la premioj estas grava solena festo, kiun ĉeestas ĉinj landanoj. La unua premio, tiu, kiu verkis la plej belan poezion pri amo, havas rajton kaj devon elekti unu sinjorinon, kiel Reĝinon de la Festo, kaj la ĉarma Reĝino presidas la feston kaj disdonacas la premiojn al la felicaj venkintoj de tiu literatura altspirita batalado.

La organiza komitato de la Kvina Internacia Esperantista Kongreso opiniis, ke tiu pirenea kutimo povus esti taŭga modelo por ĉinjara internacia literatura festo, okaze de niaj ĉinjaraj internaciaj kongresoj.

Sed, jam de du jaroj, nia ĉefa literatura gazeto «La Revuo», kiun nia Majstro honoradas per sia konstanta kunlaborado, organizis literaturajn konkursojn, kinj rimarkinde bone sukcesis, kaj kies premiojn oni disdonis en solena festo, kiu fariĝis unu el la allogaĵoj de niaj kongresoj.

Tial la Barcelona Komitato kaj la kataluna grupo «Vilasara Stelo» interkonsentis kun la Redakcio de «La Revuo» por pligeneraligi la ĉinjaran

konkurson de tiu grava gazeto, kaj ĝin aliformigi en ĉiujaran konkurson nomatan Internaciaj Floraj Ludoj.

Kompreneble, ni kiel eble plej konservis la karakteron de la pireneaj floraj ludoj, ŝanĝinte ĝin nur en tia grado, ke ĝi estu internacia.

Ni do decidis, ke:

1^e Estos ordinaraĵoj temoj, espereble ĉiamaj, kiuj verŝajne restos de nun ĉiam la samaj, dum la estontaj Floraj Ludoj: Verki poezion pri AMO, pri FIDO kaj pri HOMARO.

2^e Krom tiuj ordinaraĵoj temoj, estos eksterordinaraĵoj temoj proponitaj laŭvole de diversaj personoj, societoj aŭ gazetoj.

3^e La disdonado de l' premioj okazos dum la kongreso kaj estos unu el la ĉefaj festoj de nia tutmonda kunveno.

Kompreneble, ni respektive observos la kutimon, kaj Reĝino de la festo, elektita de la unua poeto pri Amo, prezidos apud nia honorata Majstro D^{ro} Zamenhof, kiu bonvolis akcepti honoran prezidantecon de tiu grava festo.

Nun poetoj, prozistoj, literaturistoj ĉiulandaj laboradu!

Ĝis baldaŭ en Barcelono, kie la floroj vin atendas!

La Prezidanto de la Organiza Komitato,

FREDERIC PUJULÀ I VALLÈS

UNUAJ ESPERANTISTAJ FLORAJ LUDOJ

ĜENERALA PROGRAMO

Kondiĉoj de la Konkursoj. — Ĉiuj temoj devas esti traktitaj en originala formo. *Nema traduko estas akceptita.*

La plena aŭ parta publikigo de iu ajn verko premiita, antaŭ la dato de la festo, nuligos la premion.

Unu sama verko ne povas partopreni en pli ol unu konkurso.

La premiitaj manuskriptoj apartenas, dum unu jaro post la festo, al la personoj aŭ societoj, kiuj donacis la premion.

Se post unu jaro tiuj donacintoj ne publikigis premiitan verkon, la verko refariĝas plena propaĵo de la aŭtoro, kiu povos ĝin publikigi laŭ sia bontrovo.

La nepremiitaj manuskriptoj estos resenditaj al la aŭtoroj, kiuj ilin petos, kondiĉe, ke la aŭtoroj sendos la monon necesan por la poŝta aŭfranko.

Ĉiu konkursanto estas petata:

1^e Skribi legeble sian verkon sur unu flanko de l' papero.

2^e Meti en sia manuskripto nenian signon, nenian vorton, nenian aludon pri sia nomo, loĝejo aŭ nacieco.

La konkursoj devas esti severe anonimaj.

3^e Skribi sur la unua paĝo de la manuskripto iun devizon aŭ epigrafon kaj la titolon de la konkurso, kiun celas la aŭtoro.

4^e Aldoni al la manuskripto fermitan koverton entenantan paperon, sur kiu estas skribitaj la nomo kaj plena adreso de la aŭtoro, kaj sur kies ekstera flanko estas kopiita la devizo aŭ epigrafo de la manuskripto.

5^e Meti la tuton (manuskripton kaj koverton) en koverton, kaj ĝin sendi al la Redakcio de LA REVUO, Hachette et Cie, 79, Boulevard Saint-Germain, Paris, antaŭ la unua de Julio 1909, per rekomendita poŝto.

Sciigoj pri ricevo. — Ĉar la manuskriptoj estos sennomaj, kaj la kovertoj entenantaj la nomojn de la aŭtoroj estos malfermitaj nur post la fina juĝo de la konkursoj, la komitato, nesciante la nomojn de la sendintoj, ne povos ilin persone sciigi pri la ricevo de iliaj manuskriptoj.

Tamen, por ke ĉiu konkursanto povu kontroli, ke lia manuskripto ne perdiĝis, La Revuo kaj aliaj gazetoj publikigos ĉiumonate, ĝis Julio, la devizojn aŭ epigrafojn de la ricevitaj manuskriptoj.

KOMITATO KAJ JUĜANTARO

Komitato. — La rolo de la Komitato de la Floraj Ludoj, jam konata de la Esperantistoj, estos: ricevi la manuskriptojn, konservi la kovertojn entenantajn la nomojn de la konkursantoj, dissendi la manuskriptojn al la juĝantaro, rekolekti tiujn manuskriptojn post la juĝo, kontroli poste la nomojn de la premiitoj kaj ilin sciigi, fine organizi la feston de l' disdonado de l' premioj.

La Komitato neniel partoprenos la juĝon.

Juĝantaro. — La juĝantaro konsistas el famaj Esperantistoj elektitaj de la Organiza Komitato de l' Kongreso laŭ propono de l' speciala komitato de Floraj Ludoj.

Juĝanto en unu konkurso ne povos kompreneble partopreni en tiun konkurson, sed povos partopreni en alian.

TEMOJ KAJ PREMIOJ

Ĉi sube ni publikigas le definitivan liston de la proponitaj temoj kaj de la respondaj premioj.

La Esperantistoj kun granda ĝojo konstatos la gravecon de tiu listo kaj la eminentecon de la donacintoj.

En la Kongreslando, Gereĝoj, Ministro, Rektoro de Universitato, Episkopo, Urbeŝtraroj, Deputatoj, gravaj gazetoj, honoris niajn Florajn Ludojn per donacoj.

En la Esperantistaro, nia kara Majstro, la plej famaj societoj kaj gazetoj bonvolis kunhelpi.

Al ĉiuj la Organiza Komitato adresas sian plej varman dankon.

1. — Ordinaraĵoj Temoj

1. — ESPERANTISTA SOCIETO EN VILASSAR-DE-MAR. — Poezio pri Amo. — *Bukedo el naturaj floroj.*

2. — LA REVUO. — Poezio pri Homaro. — *Arĝen-orita floro.*

3. — KONGRESA KOMITATO. — Poezio pri Fido: — *Arĝenta violo.*

2. — Temoj proponitaj de kongreslandanoj

4. — ILIAJ MAJESTAJ MOŝTOJ LA GEREĜOJ DE HISPANUJO, ALFONSO XIII kaj VICTORIA EUGENIA DE BATTENBERG. — Monografio pri hispana pentristo. — *250 pesetoj.*

5. — Lia Moŝto JOHANO DE LA CIERVA, hispana ministro de Enlandaj Aferoj. — Raporto pri memorinda paĝo de l' historio. — *Kolekto da esperantaj verkoj.*
6. — Lia Moŝto LA BARONO DE BONET, rektoro de la Barcelona Universitato. — Ĉu estas necesa la lernado kaj propagando de internacia lingvo? — 100 frankoj (s. 40).
7. — Lia Moŝto D^o JOHANO B. BENLLOCH, episkopo de Urgell. — Religia temo. — *Arta objekto.*
8. — Lia Deputata Moŝto S^o T. RIUS I TORRES. — Aro da popolaj rakontoj. — 50 pesetoj.
9. — S^o ALFONSO SABADELL, prezidanto de la Grupo Esperantista «Barcelona». — Taŭgeco de la esperantistaj kongresoj por la disvastigado de la interna ideo de Esperanto. — *Argenta poŝmonujo.*
10. — S^o JOHANO ROSALS, ĝenerala esperanta konsulo en Barcelono. — Tri broŝuretoj por propagandi Esperanton: unua por la laboristaro, dua por la mezklasa popolo, tria por la kleruloj. — 25 frankoj.
11. — S^o RAMON TOBELLA, de la esperanta presejo «Tobella & Costa». — Esperanto, bona ilo internacia por propagandi la literaturajn ĉefverkojn. — *Arta objekto.*
12. — LA VILASARA URBESTRARO. — Temo lasita al elekto de la konkursanto (prozajo). — *Arta pokalo.*
13. — LA BARCELONA DEPUTATARO. — Temo lasita al elekto de la konkursanto. — *Gravega ekzemplero de la Katedralo de Barcelono.*
14. — CENTRE AUTONOMISTA DE DEPENDENTS DEL COMERÇ I DE L'INDUSTRIA. — Tezo pri la societa devizo. «Edukado, Mutualismo, Naciismo». — 50 pesetoj.
15. — LA SOCIETAT D'ATRACCIÓ DE FORASTERS. — Barcelono, taŭga vintra restejo. — *Arta objekto.*
16. — HISPANA SOCIETO POR LA PROPAGANDO DE ESPERANTO. — Originala monologo prezentbla. — 25 frankoj.
17. — ESPERO KATALUNA. — Al la plej bone verkita aro da dek-du rakontoj, longaj je duona ĝis tuta presita paĝo, gradigitaj por praktika legado ĉe esperantaj kursoj. — 50 pesetoj.
18. — LA GRUPO ESPERANTISTA «BARCELONO». — Resuma historio de disvastigado de Esperanto. — *Arta objekto.*
19. — ESPERANTO KAJ PATRUJO, esperantista grupo en Barcelono. — Esperanto kiel diskonigilo de ideoj. — *Arta objekto.*
20. — LA BIBLIOTEKO «JOVENTUT». — Noveleto pri naciaj kutimoj. — 100 pesetoj.
21. — BONANOVA STELO, esperantista grupo en Bonanova. — La maro. — *Arta objekto.*
22. — PACO KAJ AMO, esperantista grupo en Gracia. — Esperanto, kiel simbolo de Paco kaj Amo. — *«La Faraono» lukse bindita.*
23. — SOCIETO ESPERANTISTA DE IGUALADA. — Gloro al Kolumbo! eltrovinto de la nova mondo. — *Arta objekto.*
24. — ESPERANTA SEMO, esperantista societo en Sabadell'o. — Prozajo, kiu elpruvos la emon de esperanta lingvo konservi kaj plifirmigi la naturajn lingvojn. — *Exlibris de la societo bronze farita.*
25. — VIKA ESPERANTISTARO. — Originala fablo. — 50 pesetoj.

26. — Null kataluna grupo en Parizo. — Bonhumora rakonto. — *Aro da katalunaj objektoj.*
27. — ESPERANTA FORTUNO, grupo esperantista. — Bonhumora poezio pri la pliboneco de Esperanto rilate ĝiaj malamikaj lingvoj. — *Arta alegorio de Esperanto.*
28. — LA SUNO HISPANA. — Versaro pri la patrina amo. — *Arta objekto.*
29. — TUTMONDA ESPERO. — Rakonto por la infanoj. — *Ĉiama abono al tiu ĉi revuo.*

3. — Temoj proponitaj de alilandanoj

30. — D^{ro} L. L. ZAMENHOF. — Regno de homoj. — *Plena kolekto de la verkoj de l' Majstro riĉe binditaj kaj kun manuskripta dediĉo.*
31. — PRESA ESPERANTISTA SOCIETO. — Fideleco. — *Belega portreto de D^{ro} Zamenhof, valoro Fr. 37,75 (15 sm.).*
32. — BELGA ESPERANTISTO. — Loka regiona legendo (laŭ libera temo), prozajo de 4-5 paĝoj. — *Branĉo de rozujo el fero forĝita longa je 45 cm. Belega artaĵo, specialaĵo de la urbo Antverpeno.*
33. — FRANCA ESPERANTISTO. — La plej bona originala rakonto ne pli longa ol du paĝoj aŭ kvar kolonoj kiel la felietono de Franca Esperantisto. — 25 frankoj (Sm. 10).
34. — GERMANA ESPERANTISTO. — Internacia frateco per Esperanto. — *Plena kolekto de la verkoj de la firmo Möller und Borel, riĉe binditaj.*
35. — JUNA ESPERANTISTO. — Juneco. — *Libroj el la katalogo de la «Presa Esperantista Societo», laŭ elekto de la premiita kandidato, valoro Fr. 12,50 (5 sm.).*
36. — LA REVUO. — Respondo al «La Malhelpisto de l' Hezito», vidu paĝon 231, n^o 29 de «La Revuo». — *Unua premio. — 200 frankoj (Sm. 80).*
- VERDA STELO (Meksikujo). — *Dua premio* por respondo al «La Malhelpisto de l' Hezito». — 10 piastroj (Sm. 10).
37. — LINGVO INTERNACIA. — Ni fosu nian sulkon! — *Libroj el la kolekto de L. I. (aŭ de la Presa Esp. Societo), laŭ elekto de la premiita kandidato, valoro Fr. 25 (10 sm.).*
38. — PARIS-ESPERANTO. — Kiaj estos la konsekvencoj de la aerflugado por la vivado de la homoj? — 25 frankoj (Sm. 10).
39. — POLA ESPERANTISTO. — La plej bona monologo, preferinde el la vivo esperantista. — 1^o *Belebindita jarkolekto de «Pola Esperantisto» por la jaro 1908 kaj ĉiuj literaturaj eldonoj de «P. E.», kiuj aperos antaŭ la Barcelona Kongreso.* — 2^o *Jarkolekto de «P. E.» por la jaro 1908 kaj ĉiuj literaturaj eldonoj de «P. E.» en simplaj kovriloj.* — 3^o *Jarkolekto de «P. E.» por la jaro 1908 belebindita.*
40. — THE BRITISH ESPERANTIST. — La historio de Esperanto, verkota en manuskripto de 3,000 ĝis 10,000 vortoj. — 40 sm.
41. — TRA LA FILATELIO. — Poezio pri Filatelio. — 20 frankoj da poŝmarkoj laŭ katalogo.

Por la Komitato de la Unuaj Esperantistaj Floraj Ludoj

La Sekretario,

J. PUJOL.

Aprobata de la Loka Organiza Komitato de la V^a Kongreso en kunveno okazinta la 5^{an} de Februaro 1909.

En ĝia nomo, la prezidantoj de la fako Floraj Ludoj

CARLO BOURLET.

G. VILA ROCA.

AL «ESPERANTISTEN»

Ni konas bone la diferencon, kiu estas inter atako kaj kritiko, sed vi eble ne povas diferencii la nuancojn, kiuj ekzistas inter *flato* kaj *propagandista simpatio*; tial, ni komprenas, kial, la amikajn vortojn intersanĝitajn de esperantistoj vi juĝas flato kaj trolaŭdo. Certe vi ne estas punindaj pro tio, sed estas konsilinde al vi, ke vi, kiuj havas la tegmenton el vitro, devas zorgi ne jeti ŝtonojn al tegmento de l' najbaro.

Ni jam de longe — ĉar tio apartenas al historio de la homaro — konas la gradojn da kapableco de tiuj, kiuj uzas sian tempon kritikante la laborojn de la aliaj; kaj en la literatura fako, ni scias bone klasigi la homojn, kiuj anstataŭ atenti al la fundo kaj interna ideo de la diroj, elserĉas per mikroskopo la gramatikajn erarojn. Sur tiu dek-livajo oni facile atingas la inteligentecan vicon de la homoj, kiuj aĉetas pentraĵon nur kiam la kadro estas orumita, kaj verkon pro ĝia bela bindaĵo.

Se nia gazeto estas malbone redaktita, tio ĉi neniam povos deveni de tio, ke ni intence malbonigas per reformoj nian Esperanton, al kiu ni restas kaj restos ĉiam tre fervoraj, sed de tio, ke eble nia kapablo ne permesas pli grandan perfektecon al ni. Sed, tial ke ekzistas en Esperanto, amaso da verkoj bonege verkitaj, pri kiuj oni povus multe bonparoli, via Redakcio, montras tre malbonan guston okupante sin en la legado de folioj, kiujn ĝi mem juĝas ja malbonaj. Oni povas juĝi la homojn laŭ iliaj ŝatoj.

Vi kritikis nian frazon «*Ke niaj maljunaj avoj, aŭdinte nin, mortu havante ĉe la lipoj la rideton de tiuj, kiuj forflugas sciante ke ili lasas pacon, mondon pli bonan ol la pasinta por la posteuloj.*»

Vi intencas ironie moki nin dirante ke, vi tute ne kredas ke la aŭtoro estas tiel kruela kaj postulema ke li efektive deziras ke niaj maljunaj avoj mortu ĉe kiu rideto ĉe la lipoj. Bedaŭrinde por vi, ironio estas pli malfacila ol ĝi ŝajnas, kaj bona rido ne estas ĉies riĉaĵo. Vi, kiuj tiel zorge atentis al eraroj de la aliaj, konfuzas tre malfeliĉe imperativon kaj subjunktivon: ni bedaŭras havi nek tempon, nek lokon, por klarigi al vi tiun ĉi punkton el abstrakta gramatiko.

Eble ni eraris, kiam por kontraŭstari vian *kritikon*, ni citis la favorajn, simpatiajn opiniojn de *La Revuo*, *The British Esperantist* kaj *Germana Esperantisto*, sed certe ankaŭ vi ne volis aŭ ne povis kompreni ke, kiam, ni citis al vi ties opiniojn, ni ne celis precipe defendi nin per la diro de tiuj fervoraj gazetoj, sed montri al vi la konduton de la fervoruloj, kiel ekzemplon por la via.

Via gazeto alvenas al ni nur nun, t. e. tri monatoj post sia apero. Kvankam ni komprenas, rigardinte la geografian karton, ke niaj landoj estas malproksimaj unu de la alia, ni tion rimarkigas por ke oni ankaŭ komprenu nian malfruecon en la respondo. Bedaŭrinde, ni kredas ke pli ol niaj landoj, estas malproksime unu de la aliaj la partikularaj inklinoj de via redakcio kaj de la nia; kaj eble, tio, kio ĉagrenas vin, ne estas «*ke niaj avoj mortu havante ĉe la lipoj la rideton, kiun ĉe ili naskos la konduto de la esperantistoj*» sed tio ke, «*kiam ili mortos, ili ne havos ĉe la lipoj la rideton*».

Salutojn.

LA REDAKCIO.

SENORDA KARITATO

EL «LIBRO EL HISTORIOJ»
TUJ APERONTA (1)

La vigla junulo tiom klopodis je siaj altruismaj faroj, ke li ĉe ne povis difini horon por iri ĝis la flora ĝardeno, kie loĝis lia amatino.

La mateno elŝiriĝis al li rapida kiel la paso de meteoro, por vizitoj al kaptitoj kaj malsanuloj; kaj dum la posttagmezoj li ja havis laboron konsolante senprotektulojn, donante trinki al tiu, kiu estis soifa; donante manĝi al tiu, kiu estis mortanta pro malsato. Eĉ se pliajn horojn estus havinte la tago, kaj pliajn horojn estus kalkulinte la nokto, li ne estus havinte sufiĉan tempon por trovi rimedon al tiomaj mizeroj. Tial, li ne havis unu momenton sian, ĉar ĉiuj estis por la aliaj.

Kaj kiam, malofta okazaĵo, li pasis, inter du komptaj agoj, antaŭ la flora ĝardeno, lia koro al ĝi sin klinis kvazaŭ ĝi volus forflugi. Vidante tra la branĉplena krado la amason da floroj de la ĝardeno, aŭ aŭdante la gentilan kantadon de la babilemaj elspruciloj, li sentis grandan deziron eniri tien. Sed... li rigardadis la sunhorloĝon kiu estis desegnita sur la muro, kaj ekkriis senpacience.

— Ne estas eble al mi! Je tiu horo mi devas esti tie por helpi orfon de gepatroj. Dum pli libera tago mi ĝuos ĉi tiun ĝojon.

Kaj tiam li kontentiĝis skribante al la bona amikino kelkajn vortojn sur paperon, kiun li jetis tra la florplena krado. «*Atendu min kiel vi promesis. Komparu ankoraŭ katenas min*».

(1) S-ro. R. Casellas, unu el la plej famaj verkistoj de nia lando, honoris nin permesante ke ni traduku unu el liaj neeldonitaj rakontoj. Ni estas tre feliĉaj publikigante hodiaŭ tiun ĉi verkon. La loko kiun okupas S-ro. Casellas en la batalado por la revivigo de nia lingvo, estas bona pruvo de tio, ke Esperanto ne timigas la partianojn de naturaj lingvoj.

CARITAT
DESORDENADA

DEL LLIBRE D'HISTORIES, PROXIMA
A PUBLICAR-SE.

Estava tant aqueferat el frenetic jovencel en fer obres d'altruisme, que ni d'una hora de bon lleure disposava pera arribarse al verger de flors aon vivia l'adorada.

Tot el matí se li escorria rapid com el pas d'un meteor, consagrat a la visita de malalts i presos, i a les tardes prous fines tenia en aconsolar els desamparats, en donar beure a qui tenia set, en donar vianda a qui tenia fam. Més hores hagués tingudes el dia, més hores hagués comptades la nit, que ell no hauria pas donat l'abast pera remeiar tantes miseries. Aixís és que no tenia un moment séu, perquè tots eren dels altres.

I, quan, per rara casualitat, passava, entre dos actes de misericordia, per davant del verger florit, el cor se n'hi anava, com si s'volgués envolar. Al veure per entre les reixes enramades els tous de flors del jardí, o al sentir la gentil canturia dels sortidors garlaires, un gran desig li venia de penetrar allí dins. Però... s mirava l rellotge de sol que hi havia dissenyat a la paret, i exclamava anguniós:

— No m'és possible! A tal hora haig d'esser a tal punt a amparar un orfe de pare i mare. Un dia de més vagar gaudiré aquesta delícia.

I aleshores s'acontentava amb escriure a la bona amiga un parell de mots en un paper, que tirava pel reixat florit. «*Espera-m com me téns promès. La pietat encara m'encadena*».

Kaj la damo atendadis, kiel ŝi estis jurinte. Tiel li povis kun certeco pli-longigi la oferadon de la propra feliĉeco. Kaj plena de fido en la sensangiga konsekvenco de la amikino, li prokrastadis la valorplenan momenton viziti ŝin.

—Nune—li ofte diris—mi ne juĝas min inda elspezi la tempon por la propra ĝojo, ekzistante tiom da fratoj miaj, kiuj kuŝas en la malfeliĉeco. Ĉar la amatino konas la sindonecon de mia vivo, iun aŭ alian tagon ŝi kronos min per rozoj el ŝia ĝardeno. Kaj tiu espero je dolĉeco kuraĝigis lin daŭri sur la vojo de la heroa karitato.

Tiel pasis jaroj, multaj jaroj; tiom da jaroj, ke ili estas ne kalkuleblaj. Ĝis tago kiam sin sentante la bona homo grave laca pro tiom da bonfaro al la aliuloj, li pensis:

—*Jam alvenis la horo eniri en la ĝardenon.*—Paŝo post paŝo li tien aliris kaj estante antaŭ la kradoj, li ekkriis:

—Amikino, mi estas ĉi tie! Finigis la kompata agado...

Sed neniu respondis al li. Li puŝis la kradojn, kaj ili malfermiĝas per si mem. Sed, kia malvarmo regas ĉiel! Ĉio dormadas silente kaj senzorgite. La elspruĉoj ne kantadas kaj la floroj estas velkinta... Estis pasintaj tiom da jaroj!

—Amikino de mia animo!—Ree ekkriis la homo en la soleco. Sed vane estis liaj ekkrioj. Ĉar la damo ne aŭdas lin. Kovrita de blankaj haroj, kaj kun tremetanta korpo, ŝi dormadis sub arbo senigita je folioj. Kiam li alproksimiĝis al ŝi, ŝi rigardis lin per siaj songemaj okuloj, kaj fine al li ŝi diris.

—Mi vin ne konas!

El kataluna lingvo tradukita
J. MONTSENY

MALVARMO. — Sinjoro bedaŭris pri la akra vintro dirante: Estas tiel akra la malvarmo en mia domo, ke tiajn tagojn por lavi miajn manojn, mi devas meti al mi la gantojn.

ANINO EL «E. S.»

I la dama l'esperava, com n'hi havia fet jurament. Aixís ell podia amb seguretat allargar el sacrifici de la ventura propra. I, refiat en l'immutable constancia de l'amiga, diferia l'instant preciós de visitar-la.

—Per ara — deia sovint — no m'crec digne d'esmerçar el temps en la propra joia, havent-hi tants germans meus que jeuen en l'infortuni. Com l'estimada ja sab l'abnegació de la meva vida, un dia o altre m'coronarà amb roses del sèu verger. I aquesta esperança de dolçor l'encoratjava a seguir el curs de la caritat heroica.

Així varen passar anys, molts anys; tants anys, que són incomptables. Fins que un dia, sentint-se l bon home greument afadigat d'haver fet tant bé al proïsme, va pensar:

—*Ja ha arribat l'hora de penetrar en el verger.* — Pas a pas va encaminar-s'hi, essent davant les reixes, va cridar:

—Amiga, ja sóc aquí! He acabat l'obra pietosa.

Més ningú li responia. Va empenyer les reixes, i per sí soles es varen obrir. Més ¡quina fredor regnava arreu! Tot dormia silenciós i abandonat. Els sortidors no cantaven. I les flors s'ereren marcides. ¡Havien passat tants anys!

—Amiga de la meva ànima!—tornava a clamar l'home, en la solitud. Però era en va que clamés. Perquè la dama no el sentia. Coronada de cabells blancs i tremolosa de cos, dormitava sota un arbre despullat de fulles. A l'acostar-s'hi l bon home, ella sel mirava amb els seus ulls entelats. I a la fi va dir-li:

—No us conec.

R. CASELLAS.

LA POŝHORLOĜO KIEL KOMPASO

En la naturo oni trovis por la kompasoj, ĉiuspecajn anstataŭilojn; tiel ni difinis ekzemple la ĉielregionojn ofte laŭ la ombro, iam laŭ malglataj flankoj de la arboj, k. t. p.

Laŭ loko de la leviganta suno ni difinis la ĉielregionojn *mateno-oriento*, *tagmezo-sudo*, *vespero-okcidento*, *noktmezo-nordo*: ankaŭ oni povis similmaniere uzi la lokon de la malleviganta suno.

Sed nenia anstataŭilo estas tiel fidinda kiel la poŝhorloĝo.

Se oni volas difini la ĉielregionojn, ni horizontale metas la horloĝon antaŭ ni tiamaniere, ke la malgranda montrilo vidigas la sundirekton. La mezpunkto inter la montrilo kaj la nombro dekdu de la ciferplato sunmontras precize kontraŭ sudo. Ni faru tion-ĉi klare ekzemple; kuŝas la malgrandaj montriloj preskaŭ la oka horo direktata kontraŭ la suno, tiam estos en la direkto de la nombro 10. La aliajn ĉielregionojn tiam oni facile povas difini; estas trovata nordo en la direkto de la nombro 4, okcidento kontraŭ la nombro 1, kaj oriento kontraŭ la nombro 7.

La uzado de la horloĝo kiel kompasoj estas malmulte konata, malgraŭ ke la metodo estas simplega.

Eĉ unu el la plej grandaj kaj famaj afrikaj esploristoj Henri Morton, ne konas ĝin; reveninte el centrafriko li estis demandata, ĉu li konas la simplan metodon por la difino de la ĉieldirektoj; li respondis: mi devas sincere konfesi, ke mi neniam aŭdis pri tiu ĉi facila difinmaniero.

El la revuo por Esperanta Stenografio eliris.

LL. B.

Tiuj kiuj interesiĝas pri la Esperanta Stenografio aŭ deziras scii pri ĝi, povas sin turni katalune aŭ esperante, per letero afrankita por la respondo al S-ro Lluís Bacardit, ĉe «Espero Kataluna».

KURIOZAĴO. — Unu Hispana monaĥo, Fra Romano Pane, kiu kun Kolombo iris Amerikon, estis la unua kiu konatigis Eŭropon pri la tabako: Tiu vidis sovaĝulojn en la Antiloj sur la insulo Tabagos envolvitajn foliojn preni en la buŝojn, tiujn ekbruligi kaj el la buŝoj fumellasi. Tial li ankaŭ kolektinte tabakfoliojn revenis hejmen. En Lisabono volis provi la fumadon: Li eksidiĝis apud kameno kaj li komencis indianmaniere terurege fumi.

En tiu momento veninta servisto ektimegis opiniante, ke lia sinjoro en fumo brulas; li en sia maltrankvileco elverŝis kruĉon da akvo sur lian mastron — por lin savi. Tiel estis Eŭroponveno de la tabako.

EM. BATEK,
ekslernejestro en Osek ap. Rokycany

KREDO

*Forgesante estontecon,
Ĉar senĉese trompas ĝi,
Mi atendas feliĉecon
Nur de l' vivo, tie ĉi.*

*Mi hodiaŭ estas reĝo,
Ĉar aminda amas min:
Mia trono — mia seĝo
Apud mia amatin.*

*Erariga estonteco,
Malaperu de mi for!
Estas nuna feliĉeco
Pli agrabla por la kor'!*

*Mizerulon por hodiaŭ
Pli ĝojigas unu groŝ' (*)
Ol miljona la kambio
Por estonto en la poŝ'!*

*Paradizo — por la pastroj;
Por famuloj — granda glori;
Mona — por la bonaj mastroj
Kaj por mi — nur via kor'!*

*Anu min kaj vivu ĝoje
Amatino mia nun:
Ĉio pasas; duafoje
Ni ne vivos sub la sun'!*

G. CIKLARI (Tiflisano)

(*) Groŝo = 5 centimoj.

ANEKDOTO

Okazis iam, ke almozulo frapis pordon. La loĝanto de la kvara etaĝo eliris al la balkono kaj demandis al li: Kion vi deziras?

— Malsupreniru — respondis la almozulo. — La loĝanto, malsupreniris la ŝtuparon kaj kiam li estis malsupre, ree demandis al la almozulo; Kion vi deziras?

— Bonvolu — li respondis doni al mi almozeton. — La sinjoro rigardis la ŝercemulon kaj diris: Supreniru kun mi la ŝtuparon. Alvenante al la supro, li donis al la malriĉulo tiun-ĉi almozon; Dio akompanu vin, sinjoro: kaj li fermis brue la pordon antaŭ la nazo de tiu ŝercema almozulc.

SPIRITA SPRITAĴO

Vidvo sin turnas al la prezidanto dirante: Ĉu mi povus paroli kun la spirito de mia kara edzino mortinta de kelkaj tagoj?

— Jes — respondas la prezidanto, kaj tuj demandas. — Kiajn demandojn vi deziras al ŝi fari?

— Nur unu, li trankvile respondas. — Nur mi dezirus demandi al ŝi kien ŝi enmetis miajn kolumojn kaj manumojn, ĉar mi trovis ilin nenie.

EN FRENEZULEJO

Starante frenezulo post fenestro, rigardante eksteren, vidis trairi homon levante kaj mallevante la brakojn, jen kurante antaŭen, jen saltante posten, k. t. p.

Fine la internulo ekkriis: Zorgu, ĉar mi ankaŭ ekkomencis same.

ANINO EL «E. S.»

MOVIMENT ESPERANTISTA CATALÀ

Arbeca. — Amb el nom de «Ĉielarko» ha quedat constituïda en aquest poble una associació esperantista adherida a «Espero Kataluna», la Junta de la qual està formada pels senyors següents: president, Francesc Gelambí; vic-president, Josep Sans; secretari, Joaquim Vila; tresorer, Vicenç Astort; vocals: Francesc Galceran i Joan Vidal.

Desitgem a la novella agrupació força entusiasme pera què, amb constancia pugui fer sentir la propaganda de *nia celo* per aquelles encontrades.

Barcelona. — A l'Atencu Obrer del districte segon s'ha obert, a carrec del Sr. Bordas, un curs de la llengua internacional pera ambdós sexes, que s'veu molt animat.

— Convocades per l'agrupació «Kulturo», les agrupacions esperantistes es reüniren en son local pera tractar de la fundació d'un orfeó esperantista.

La nova fou acullida amb entusiasme, acordant-se fer els treballs pera la próxima constitució de dit orfeó.

— Seguint les excursions projectades, l'agrupació «Kulturo», el 28 de Febrer, va fer una excursió al Parc Güell, amb assistència dels Srs. Cases i Pujulà i la distingida senyora d'aquest.

— El dia 10, en el local d'«E. K.», va inaugurar-se, de nou a deŭ del vespre, pera continuar a la mateixa hora tots els dimecres i divendres, un curs d'Esperanto a carrec del secretari de les «Escoles Berlitz», de Barcelona, Sr. Dalmau.

Donada l'originalitat del metode d'ensenyança pera aprendre la llengua auxiliar, el curs, desde son començament, s'ha vist molt concorregut.

— A la barriada d'Horta s'acaba de fundar una nova agrupació amb el nom de «Superideo», havent sigut constituïda la Junta Directiva en la següent forma: presidents honoraris: D-ro L. L. Zamenhof i Maurici F. d'Eixalà; president efectiu, Ferran Torné; secretari, Josep Serra; caixer, Enric Estañol; bibliotecari, Ernest Cabañes; vocals: Joan Bertran, Manel Ruyra i Pere Brunat.

— El dia 24 de Febrer, de retorn d'una anada que l'agrupació féu a la montanya d'Horta, els invitats Srs. Ferrer i González aprofitaren el temps pronunciant dos discursos en Esperanto en el local de la cooperativa «La Vanguardia Obrera», rebent forts aplaudiments.

— El dia 25 de Febrer, amb motiu de l'inauguració del curs que dona l senyor González en el local de «Solidaritat Obrera», el propagandista Sr. Pujulà i Vallès va donar una conferència, essent escoltat amb religiosa atenció per nombrós auditori.

— Amb gran exit, l'agrupació «La Stelo de Les Corts» va celebrar, el 27 del passat, una vetllada literaria i musical de propaganda, prenent-hi part els Srs. Ferrer, Martí i el rus Ciklari.

El Sr. González va interpretar el monoleg den Pompeu Gener, traduït a l'Esperanto, *Filozofiaj pripensoj de malsaĝa kapo*, amenitzant la vetllada el Sr. Reig, qui va cantar *La Kanto de la Cigno* i *La Vojo*, finalitzant tant simpatica festa amb el cant de *La Espero*.

Vilanova i Goltrú. — En Junta general ordinaria, l'agrupació «Laboro Esperanta» ha nomenat la següent Junta Directiva: president honorari, D-ro L. Zamenhof

president, Francesc Mestres; secretari, Joan Orriols; caixer, Josep Garcia; bibliotecari, Josep Escofet; vocals: Pere Colomer, Jaume Vadell i Angel Capitán.

Vilassar de Mar. — El dia 7 del passat hi tingué lloc l'inauguració d'una nova agrupació esperantista, fundada en el «Foment Vilassarenc» com a secció del mateix.

Assistiren a l'acte alguns esperantistes de Barcelona i una representació de l'«Esperantista Grupeto» de Teià.

Usaren de la paraula ls Srs. Tobella, d'«Espero Kataluna»; Casanovas, de la secció esperantista del «Centre Autonomista de Dependents del Comerç i de l'Indústria», de Barcelona; i els membres del Comitè del Congrés Mme. Rebours de Pujulà, Vila Roca i el president del mateix, Sr. Pujulà i Vallès, qui, amb la seva cloquència de costum, va parlar de la grandiosa festa de què amb seguretat seria teatre aquell poble, un dels dies del vinent Congrés, en celebració dels primers «Jocs Florals Esperantistes», i de la gran importància que té l'institució d'aital festa en el món esperantista.

KATALUNA ESPERANTISTA MOVADO

Arbeca. — Nova grupo nomita «Ĉielarko» kies Direkta Komitato estas formata jenmaniere: prezidanto, F. Gelambí; vicprezidanto, J. Sans; sekretario, J. Vila; kasisto, V. Astor; voĉdonantoj, F. Galceran kaj J. Vidal.

Barcelona. — Nova kurso en l' «Ateneu Obrer del Districte II.^{on}» gvidata de S-ro Bordas.

— La grupo «Kulturo» faris alvokon al la esperantistaj societoj de nia urbo, por la kreo de Esperanta horo. Ni deziras ke tiu simpatia ideo prosperu.

La sama grupo komencis serion da ekskursoj por praktiki nian lingvon.

— Novan kurson ĉe «Espero Kataluna» malfermis laŭ Berlitz'a sistemo, S-ro Delfi Dalmau, sekretario de la Berlitz'a Lernejo en Barcelono.

— Grupo sub nomo «Superideo» fondiĝis en la kvartalo de Horta. Jen la Direkta Komitato: honoraj prezidantoj L. L. Zamenhof kaj Maŭrico F. de Eixalà; prezidanto, F. Torné; sekretario, J. Serra; kasisto, E. Estañol; bibliotekisto, E. Cabanyes; voĉdonantoj, J. Bertran, M. Ruyra kaj P. Brunat.

En la loĝejo de tiu grupo faris S-roj Ferrer kaj González propagandajn paroladojn.

— Parolado de S-ro Pujulà ĉe la «Solidaritat Obrera» la 25^{an} de Februaro.

— La grupo «Stelo» de Les Corts, organizis vesperkunvenon en kiu partoprenis inter aliaj, S-roj Ferrer, Martí, Reig, González, kaj la ruso Ciklari.

Vilanova i Geltrú. — Nova estraro de «Laboro Esperanta»: honora prezidanto D-ro Zamenhof; prezidanto, F. Mestres; sekretario, J. Orriols; kasisto, J. Garcia; bibliotekisto, J. Escofet; voĉdonantoj, P. Colomer, J. Vadell kaj A. Capitán.

Vilassar de Mar. — Okaze de la fondo de «Esperanta Sekcio» en la grava societo «Foment Vilassarenc», la 7^{an} de la pasinta monato okazis paroladaro, en kiu partoprenis S-roj Tobella, Casanovas, Vila Roca, Pujulà Vallès kaj S-ro Rebours de Pujulà.

MOVIMENT ESPERANTISTA MONDIAL

Australia. — Acaba de fundar-se a Sidney una «Secció Esperantista» a la «Societat Teosofica».

Bohemia. — El nostre estimat kolaborador i ferm propagandista, S-ro. E. Batek, ha publicat una serie d'articles a l'important revista ŽDĀR, que surt a Rokycany. Aquesta població, on la nostra revista, TUTMONDA ESPERO (KATALUNA ESPERANTISTO) és molt llegida, pot ben dir-se que és una de les que més s'ha manifestat plenament en pro de la llengua internacional, celebrant-se freqüentment petites exposicions en el local de l'agrupació «Maja Stelo». La nostra enhorabona an el mestre organizador, S-ro Batek.

— Durant la vinenta Pasqua, del 10 al 12 d'Abril proxima, tindrà lloc a Praha un Congrés dels partidaris de l'Esperanto, del pacifisme i del lliurepensament.

Belgica. — A Bruges, després d'una conferència de M. Witteryck a presència de les autoritats locals, se va fundar l'«Esperanta Instruista Flandra Societo».

França. — El Comitè Central de la «Federació Esperantista de la Regió Parisenca» ha decidit que l primer Congrés de la mateixa tingui lloc a París els dies 17 i 18 del corrent Abril.

— L'Ajuntament de Tolosa ha subvencionat l'agrupació esperantista amb la quantitat de 300 francs.

— En la famosament coneguda cavalcada de Niça, hi ha concorregut, aquest any, luxosament adornat, el «Carro de l'Esperanto», que era ocupat pels principals membres de l'agrupació esperantista i essent un gros *propagandilo*.

Grecia. — El Director de l'Escola de Comerç de Patras s'ha interessat, estudiant-la seriosament, per la llengua internacional, amb el desig d'ajudar els seus companys, que acaben de fundar el mensual «Greklingva Esperantisto».

Polonia. — L'estiu de 1909, tindrà lloc a Censtoŭova una Exposició industrial-agrícola, en la que hi haurà una secció esperanta, puix la «Pola Esperantista Societo» ha acceptat la proposició que en aquest sentit li fou feta pel Comitè organizador de l'Exposició.

Portugal. — A Lisboa, els Sr. Horner i el Dr. Costa Esteves, han fet parlament a favor de l'Esperanto en la «Kristnaska Uniiĝo de la Junularo», obrint-hi un curs, al qual assisteixen 40 deixebles.

— A Arcos, Oporto, Evora i Funchal (illa de Madeira) han tingut també lloc actes de propaganda.

Xina. — La revista *Tien Yee* ha començat una activa campanya a favor de l'Esperanto.

EN LERNEJO. — Lernejo iam estis vizitata de S-ro Inspektoro. Li demandis al la unua el la lernantoj. Ĉu la profesoro uzas tre ofte la adjektivojn kaj la adverbojn? Jes, sinjoro, respondis tuj la knabeto, sed, li trouzas la batilon.

ANINO EL «E. S.»

BIBLIOGRAFIO

En tiu-ĉi fako oni konigos la verkojn kies aŭtoroj donacis du ekzemplerojn al «T. E.».

IS ESPERANTO WORTH LEARNING? (Estas Esperanto lerninda?) de sinjoro Bernard Long. Eldonita de S-roj Biggie & C.^o, Rothesay, Skotland. Prezo 1 peniko.

Jen libreto tre bonstila verkita kiun ni rekomendas varmege al niaj legantoj kuantaj la anglan lingvon. L' aŭtoro tre lerte pruvas la grandajn vantajojn kiujn l' alprenado de nia kara lingvo alportos, ne nur al komerco kaj turismo, sed ankaŭ al la publika instruado, ĉar li tre prave opinias ke la lernado de ĝiaj fundamentaj reguloj kaj vortfarado estas, krom ĝia praktika utileco, bonega intelekta ekzercilo (*mental training*). Unu el la plej remarkindaj ĉapitroj estas la XII^a enhavanta la opiniojn de multaj ĉeestintoj al la Kembra Kongreso, pri ĝia sukceso, inter aliaj, tiujn de niaj samlandanoj S-roj Rosals kaj Sabadell.

Ni kore gratulas la kleran verkiston kiu tiel bone scias propagi la genian ajon de D-ro Zamenhof, dum ni atendas povi saluti lin en nia turbo, ĉar ni esperas ke li honoros nin kun lia vizito en la V^a Kongreso.

J. P. T.

KIEL NI PLIBELIGOS LA VIVON. Aŭtoro, Saĝulo; eldonisto Esperanto Verlag Müller Borel. Berlin S. Prezo 0'25 sm.

KRISTNASKA ESPERANTA KANTARETO. 11 kantoj kun melodioj. Eldoninto P. Hubner Müllerin a. Rhein. Redakcio de Dia Regno Friedrich Vilhelmstr. 66 Prezo 25 sd.

KVIN RAKONTOJ: EN SVISLANDO. El verkoj de svisaj aŭtoroj elektis kaj tradukis E. Ramo, Prezo, 3 fr. Librairie de l' Esperanto, 15, Rue de Montmartre, Paris.

Rekomendinda verko kiu krom kelkaj klisajoj pri Svisujo enhavas; «La lasta ekskurso de Maŭrico Clévoz»; «Bona malliberulo», «Patrino», «La Vengonto», kaj «La Trompisto».

FAUT-IL RÉFORMER L'ESPERANTO? Aŭtoro Georges Kolovrat, licencié es-lettres. Prezo, 0'25 fr. Rue Lacepède, 33, Paris.

Tiu-ĉi libro estas la unua de tuta serio publikigita de la «Société française pour la propagation de l' Esperanto».

ESPERANTISTA POŜKALENDARO. Prezo, mk: 0'80 (0'40 sm.). Esperanto Verlag, Müller & Borel, Berlin, s. 42.

Tiu utiliga verko por ĉiu esperantisto, aperis jam. Krom la dataro, ĝi enhavas tre kuriozajn artikolojn pri Esperanta Stenografio, Monsistemoj, Barcelono Kongresa Urbo, Esperantista Gazetaro k. t. p. Kompleta listo de la esperanta societaro plivalorigas ĝin multe.

INTERNACIA LEGOLIBRO (dua eldono): eldonita de E. Stark kaj Fr. Rockman. Prezo, 1'20 mk. ĉe H. Wuttke, Magdeburg Pionier, Str. 21.

LA DOGMARO PRI LA VIVO, por la nova Jerusalemo; de Em. Swedenborg; ĉe Swedenborg Society, 1, Bloomsbury Street London.

Tiu ĉi verko enhavas krom bibliografian noton pri la aŭtoro, 60 paĝojn da teksto; la bindo de la libro tre luksa.

*

COURS ÉLÉMENTAIRE PRATIQUE D'ESPERANTO. Aŭtoroj, Michel Becker kaj E. Grosjean-Maupin. Kolekto de «La Revuo». Prezo, 1 fr.

*

COURS MÉTHODIQUE D'ESPERANTO (VERSIONS). Aŭtoroj, Camille Aymonier kaj E. Grosjean-Maupin. Kolekto de «La Revuo». Prezo, 1'20 fr.

*

COURS MÉTHODIQUE D'ESPERANTO (THÉMES). Samaj aŭtoroj kaj sama prezo.

La francoj kiuj neniel povas plendi pri la manko de lernolibroj verkitaj de la plej eminentaj esperantistoj, havas ankoraŭ en la tri verkoj nomitaj, neplibonigeblajn esperantlernilojn.

La modeste nomita de la aŭtoroj *Cours élémentaire*, estas farita laŭ vidpunkto tiel praktita, ke la rezultoj de ĝiaj adoptantoj nepre devas esti bonegaj. Ni rimarkigu tamen la jenajn esprimojn; *kvaronjaron* (laŭ nia opinio *jarkvaronon*), *duonjaron*, (*jarduonon*), *herbejo* (pli ekzakte *herbokreskejo*, aŭ *herbokampo*).

La du aliaj verkoj havas kiel aŭtoron S-on Aymonier. La nomo de l' konata franca gramatikisto, sufiĉas.

*

JOLANTO LA FILINO DE L' REĈO RENÉ. Aŭtoro, Henriko Hertz; tradukinto, Hj. J. Runeberg. Prezo, 1'25 fr. ĉe Harejo Esperantista. Helsingfors.

Niaj legantoj kiuj iam ŝatis legi ĉiusemajne la katalunan gazeton *Juventut*, eble memoros la nomon Runeberg; kelkaj ĉarmaj rakontoj de la finna literaturo tradukitaj en katalunan lingvon kaj sur tiu gazeto aperintaj, estis subskribitaj de tiu nomo, de la nomo de l' fama aŭtoro de «Nya Land», de Runeberg, la nacia poeto de Finnlando.

Lia nepo, Hjalmar, kies amikeco estas al ni granda honoro, unu el la plej bonaj nuntempaj poetoj de tiu norda lando, estas la tradukinto de Jolanto.

Vere oni konstatas se oni legas la ĉarman dramon de Hertz, ke la nepo Runeberg heredis de la avo lian poezian animon, ĉar la rimo de l' versoj, la beleco de la esprimoj kaj la eleganteco de la frazoj donas altan valoron al la verko, nepre posedota de ĉiu esperantisto deziranta havi en sia biblioteko veran juvelon el la esperanta literaturo.

*

LA PERFEKTA EDZINO. Aŭtoro, Fray Luis de León; tradukinto, Augusto Jiménez Loira. Prezo, 2 pesetoj.

La tradukinto S-ro Jiménez Loira meritas sinceran aplaŭdon; la fama verko de la hispana monaĥo, kiu tiom da belajoj enhavas, povos de nun, dank' al la laboro de S-ro Loira esti legata ĉie, en Esperanto.

La malfacileco de la traduko devis esti granda en *La Perfekta Edzino*, ĉar ĝi apartenas al la antikvaj juveloj de la Kastila Literaturo, kies tradukebleco kompare kun nunaj literaturaĵoj estas tre malgranda; sed malgraŭ tio, la tradukinto konas bone sian metion, ĉar seninterrompe oni legas la libron kun intereso kaj ŝato, pro la boneco de la traduko.

Unu rimarko. Ĉu oni ne povus zorgi en la esperantaj verkoj pri la preseraroj? bedaŭrinde, estas kompreneble ke, ĝis kiam la kompostistoj konos Esperanton entute, oni ne povos forigi la erarojn... sed malgraŭ tio, tri paĝoj en la fino de l' teksto por la eraroj de presado... estas tro da paĝoj.

*

TRA LA MONDO PER ESPERANTO. Aŭtoro, Georgi Ciklari (Tiflisano). Prezo, 10 sd. (25 cent.)

S-ro Ciklari, juna tifisano ĵus alveninta Barcelonon, publikigis sub formo de poemeto tre interesan rakonton priskribantan lian vojaĝon per Esperanto tra eŭropaj landoj. Ĝi estas aĉetinda verketo.

AVIS: Demanem, an els secretaris de les agrupacions esperantistes catalanes, que ns enviin sovint noticies de l'acció de l'agrupació respectiva.

Aquests informes han de ser enviats abans del dia 15 de cada més.

REDAKCIA KORESPONDADO

S-ro F. F. Oni ricevis vian rakonteton.—*S-ro A. V.* Ne malpaciencigu; ni ricevis ĉion, kion vi sendis, kaj oni publikigos kelkajn el viaj verkoj. La aferoj pri la Kongreso okupas tiom da spaco, ke nun nur malmultaj paĝoj estas rezervitaj al literaturajoj.—*Fino A. S.* Dankon, ĝi aperos.—*S-ro J. C.* Pri aferoj koncernantaj la administracion, vi povas rekte vin turni al S-ro Enric Ribera, Raurich, 6 (El Ingenio) Barcelono.—*S-ro S. W. Stelo Kataluna* ĉesis aperi de antaŭ kelkaj monatoj.—*Sinjoro S. L.* Skribu pli klare vian proponon.—*Restas leteroj por respondi.*

ESPERANTISTA GAZETARO

Gazetoj redaktitaj nur Esperante kaj peresperantaj gazetoj

FRANCLANDO

La Revuo. Monata. — 7 fr. jaro. — Adm.: Hachette et Cie., 79, Boulevard Saint-Germain, Paris.
Lingvo Internacia. — 5 fr. — Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris.
Esperanta Ligilo. Por blinduloj. — 3 fr. — Th. Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.
Espero Katolika. — 5 fr. — Em. Peltier, Sainte-Radegonde, Tours (Indre-et-Loire).
Espero Pacifista. — 5 fr. — Gaston Moch, 26, Rue de Chartres, Neuilly (Seine).
Oficiala Gazeto Esperantista. — 5 fr. — Rue de Cllichy, 51, Paris.
Internacia Socia Revuo. — 6 fr. — Adm.: R. Louis, 45, Rue de Saintonge, Paris.
Juna Esperantisto. — 2 fr. 50. — Adm.: Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris.

Tra la Filatelio. — 2 fr. — J. Fize au Patisson Béziers.

Laboro. — 3 fr. — P. Blaise, 4, Rue Bourg-Tibourg, Paris.

GERMANLANDO

Eho Esperantista. — 6 fr. — Adm.: J. H. Schorer, Dessauerstrasse, 29, Berlin.

La Bela Mondo. Ilustrita. — 7 fr. — 12, Bismarckplaco, Dresdeno.

SVISLANDO

Internacia Scienca Revuo. — 7 fr. — Adm.: Scienca Oficejo, 8, Rue Bowy-Lysberg, Genève.

Flugila Stelo. Stenografia gazeto, 2 fr. — Fr. Schneberger Laufen (Bern).

Scisa Espero. — 3 fr. — Th. Renard, 6, Vieux-Colège, Genève.



* ESPERANTA PRESEJO *
Strato Asalto, 45 - Barcelono

TUTMONDA ESPERO

Atenció, esperantistes!

Encara es possible adquirir algunas colleccions de TUTMONDA ESPERO de l'any 1908.

Collecció	Prezo
Collecció sense relligar	3
» » » (compres franqueig)	5'25
Collecció ricament relligada amb artistiques cobertes de tela groguenca portant el nom de la revista estampat amb tinta verda.	5'25
Collecció en les mateixes condicions (compres franqueig)	5'75
Cobertes soles	1'50
» » » (compres franqueig)	1'75

Atentu, esperantistoj!


Estas aĉeteblaj ankoraŭ kelkaj kolektoj de TUTMONDA ESPERO de la jaro 1908.

Collecció	Prezo
Kolekto ne ligitita	3
» » » (afrankite)	3'25
» » » ligitita kun artaj kovriloj el flava stofa havante la nomon de la revuo, verdokolore presita	5'25
Kolekto same kondiĉa (afrankite)	5'75
Kovriloj solaj	1'50
» » » (afrankite)	1'75

Sin turni al sinjoro Administranto de TUTMONDA ESPERO (Raurich, 6 - BARCELONA)

ĈAPELOJ KAJ ĈAPOJ

ONI VENDAS ILIN MALALTPREZE



Manuelo Ballespi

strato Ampie, 41, apud Regomir
BARCELONO - (KATALUNUJO)



Esperanta Presejo

LITERATURO - SCIENCO - ARTO

KOMERCAJ PRESAĴOJ, K. T. P.

TOBERRA & COSTA: Strato Asalto, 45 - BARCELONO